

Enhavo

- **anoncoj**

Tim WESTOVER instruos ĉe NASK; Details for the upcoming Detroit Landa Kongreso; Nova grupo por numismatoj; Forpasis Stevens NORVELL; Ĉu vi volas gastigi la LK-on en 2017?; Korespondi deziras

- **Venu al la Komuna Kongreso en Detroĵto!**

anoncoj

la 63-a Landa Kongreso de Esperanto-USA estos parto de Komuna Kongreso de la usona kaj kanada Esperanto-asocioj. Ĝi okazos de la 26-a de Junio (vendredo) vespere, ĝis la 29-a (lundo) tagmeze en Detroĵto, Miĉigano.

- **“Al ĉiu homo estas nomo”**

loke - Fred Meyer, III

La ĉeftemo de la kunmemorigo estis legado de la nomoj de tiuj, kiuj mortis en la Holokaŭsto antaŭ pli ol sepdek jaroj en Eŭropo. Subtemo de la ĉi-jara programo estis *besa*, aŭ albana gastamo.

- **Tertremo en Nepalo**

anoncoj

En Nepalo okazis katastrofa tertremo, kiu mortigis pli ol sep mil homojn kaj senhejmigis kelkcent mil pli. Jen raporto de Bharat GHIMIRE, Ĝenerala Sekretario de la Nepala Esperanto-Asocio. Sekvas informo pri kiel helpi viktimojn.

- **Vorto-Mozaiko: krucvortludo por Esperanto**

ludoj - Hoss Firooznia

Ofta ĝeno de tradukitaj vortludoj estas, ke ili ne bone konvenas al la lingvaj trajtoj de Esperanto. Sed Vorto-Mozaiko estas krucvortludo elpensita speciale por nia lingvo.

- **Deka**

senintenca esperantaĵo? - Breto Sanders

“Ĉu tio ĉi signifas ke finfine, post naŭ antaŭaj aĉetoj, mi efektive trovis unu baterion kiu funkcios?”

- **Pace**

senintenca esperantaĵo? - Daĉjo Rutan

“Bona maniero manĝi spican manĝaĵon, ĉu?”

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2015:2 (mar-apr)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2015:2 (mar-apr)



© Del Arte / Wikimedia / CC-BY-SA-3.0

Tempo fuĝas por aliĝi al la Landa Kongreso en Detroĵto!

Ĉi-numere:

- Anoncoj: UK-2017 okazos en Seŭlo
- Ludoj: Vorto-Mozaiko: ĉu pli konvena al Esperanto ol Skrablo?
- Kaj multe pli...

anoncoj

Tim WESTOVER instruos ĉe NASK

Aldone al la jam anoncitaj instruistoj por NASK-2015 [<http://nask.esperantic.org>] venos ankaŭ Tim WESTOVER, kiu instruos la meznivelan kurson kun Lee MILLER.



Tim estas lerta verkisto, ne nur en Esperanto sed ankaŭ la angla. Li estis plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj tri el liaj premiitaj noveloj aperis en la kolekto *Marvirinstrato*. Aliaj liaj verkoj aperis i.a. en *Fonto*, *Beletra Almanako*, kaj *Literatura Foiro*. Pli lastatempe, legantoj forte laŭdis lian novan anglalingvan romanon *Auraria*.

Tim plurfoje partoprenis en NASK kiel helpinstruisto, kaj en 2012 li instruis la postbazan kurson. Profesie li laboras kiel retrogramisto en Georgio, Usono.

Details for the upcoming Detroit Landa Kongreso

For those seeking activities unrelated to Esperanto, the Kongreso will be in the Cultural Center of Detroit, so there is the Detroit Institute of Arts across the street from our Congress site, and the Main Public Library across the street from there has wonderful art and sculptures and collections. The Detroit Historical Museum next to the Main Library has exhibits, including *The Streets of Detroit* which is unforgettable. The largest African-American museum in the world is next door to the Science Center – both also within walking distance. The Reuther Library is on campus – Reuthers of union fame! Many boutiques and coffee shops are nearby. And a mile or so away is the Motown Museum.



The dorms are modern – not like what I slept in (or tried to) at SFSU in the 1980s for the 3-week Esperanto course. Participants will be in two-person

rooms with their own bathroom, and linens are included at \$10 person (included in our rate). There are laundry facilities in the building (\$1.25 each for wash and dry), and a kitchenette is available on each floor. Parking card options include in-and-out privileges and cost less than \$7.25 per day on a prepaid card. The cost is \$10 per day for use of the Recreation and Fitness Center.

— Sherry A. Wells, <esperantosherry@tm.net>

[For more information about the 2015 Congress, see this month's article. You can buy tickets through the Esperanto-USA bookstore

[<http://esperanto-usa.org/retbutiko>

/index.php?main_page=index&cPath=1004] —Ed.]

Nova grupo por numismatoj

Antaŭ nelonge belga esperantisto fondis la grupon *Esperanto Numismatika Asocio*, (ENA) kies celo estas informi esperantistojn mondvaste pri Esperantaj medaloj, moneroj kaj diversaj aliaj pagiloj kaj numismatikaĵoj.



Se vi volas membriĝi, simple sendu retmesaĝon al <bert.boon@skynet.be> en Belgujo. (Ne ekzistas poŝta adreso.) Membrecio estas senpaga kaj dumviva. ENA ne havas nek havos estraron; ĉiuj membroj estas egalvaloraj.

Ankaŭ senpaga estas la reta revuo *Esperanta Numismatiko* (kvarfoje jare) kies redaktistoj estas la membroj mem.

[Dankon al Vilĉjo HARMON pro la sciigo. —Red.]

Forpasis Stevens NORVELL

Stevens (Steĉjo) NORVELL mortis la 7-an de Februaro, nur kvar tagojn antaŭ sia 92-a naskiĝdatreveno, post mallonga malsano.

Li naskiĝis en Usono en la jaro 1923. Li estis la unua el tri infanoj de Stevens NORVELL (inĝeniero) kaj Cora Kellam NORVELL (instruistino). Li kaj du

fratinoj plenkreskiĝis en Western Springs, Ilinojso, eta antaŭurbo de Ĉikago. Li vizitadis publikajn lernejojn en la hejmvilaĝo kaj en la apuda urbeto LaGrange. Pro la Granda Depresio la familio estis iom malriĉa, sed la patro almenaŭ havis laboron, kaj danke al granda ĝardeno, ili havis sufiĉe da manĝaĵo.



En la adoleskaj jaroj, kiam li estis skolto, Stevens renkontis Esperanton, aĉetis librojn, kaj lernis la lingvon meminstrue, tamen nur lege-skribe. Li jam studis Latinon kaj la germanan, kaj altiris lin la logika strukturo de Esperanto. Li ŝerc-diris, ke li fariĝis esperantisto kiam li unuafoje vidis la tabelvortojn. Li komencis tutmonde korespondi; tamen unu el la plej fruaj korespondamikoj estis A. E. REGAL, bahaano kiu loĝis en fora antaŭurbo de Ĉikago. Steĉjo ĉiam sendis du kopiojn de ĉiu letero: unu por s-ro Regal, kaj unu por korekti kaj resendi.

Bonŝance li povis studi universitat-nivele dum du jaroj en la publika lernejo en la apuda urbeto. Okazis milito, kaj li enskribiĝis en la armeon en 1942 — sed pro tio, ke li volis fariĝi kuracisto, oni permesis al li daŭrigi siajn studojn ĝis 1943. Poste, li estis trejnata kiel soldato kaj lernis 14 metodojn por murdi homojn — “iom senutila afero”, li poste komentis. Post granda ekzameno, la armeo kaj la Medicina Fakultato de la Universitato de Ilinojso decidis, ke Stevens studu medicinon en Ĉikago. Fakte, tiutempe preskaŭ ĉiuj el la medicinaj studentoj estis en militist-uniformoj.

Stevens fariĝis refoje civitano en 1946 kaj daŭrigis la medicinajn studojn. Li estis elektita al AΩA, la honora medicina societo, en 1947. Li ricevis diplomon Doktoro de Medicino (kun honoroj) en 1947 kaj servis kiel enhospitala kuracisto ĉe la malsanulejo de konteo Cook en Ĉikago ĝis Junio 1948.

Li edzinigis s-inon Dorothy DUNGAN, kvakerinon, en kunveno de la Societo de Amikoj, en Downer’s Grove, Ilinojso, en Junio de 1948. La unua hejmo kune estis en Elk City, Oklahomo, kie Stevens laboris kiel famili-kuracisto en kooperativa kliniko kaj malsanulejo.

Post jaroj da trapensado, Stevens fariĝis pacifisto.

Por eviti militservon en Koreujo, li kun sia edzino translokiĝis al Kanado en 1950 (ili fariĝis civitanoj en 1957). Steĉjo laboris kiel famili-kuracisto en eta vilaĝo en Brita Kolumbio ĝis 1953. Poste li studis kaj trejniĝis dum ok jaroj en Edmontono kaj en Colchester, Anglujo por fariĝi ĝenerala ĥirurgo, kaj bone sukcesis en ĉiuj ekzamenoj.

En la jaro 1961 la paro alvenis al Halifakso kune kun novnaskita filino, Cindy. La filo, Theodore, naskiĝis en Halifakso du jarojn poste. Stevens fariĝis instruisto en la Departemento de Ĥirurgio ĉe la universitato Dalhousie, kie li laboris dum 32 jaroj kaj fariĝis Plena Profesoro. Dum tiu tempo li gvidis la junajn ĥirurgojn en la trejnado, okupiĝis pri ĝenerala ĥirurgio, urĝaj kazoj, kancero, kaj aparte pri la plej danĝera haŭtkancero, melanomo. Li esploris, aparte pri melanomo, kaj kontribuis 50 artikolojn al la scienca literaturo. Li kreis tutkanadan ekzamenon por junaj ĥirurgoj, kaj ankoraŭ ĉiujare la Norvell-premio estas aljuĝata al iu inter la superaj ekzamenitoj.

Iom antaŭ emeritiĝo, Stevens malkabeis al Esperanto. Li aliĝis al la Halifaksa Rondo kaj komencis ĉiusomere vizitadi NASK-on, la faman someran kursaron fonditan de Cathy SCHULZE, en San-Francisko kaj Vermonto. Li provizis domon por la libraro de Harry LEWIS kaj iompostioe pligrandigis la kolekton ĝis 2000 libroj, kiujn li finfine donis al la Kanada Esperanto-Asocio. Li partoprenis en Universalaj Kongresoj en Kubo (1990), Norvegujo (1991), Aŭstrujo (1992), Hispanujo (1993), Finnlando (1995), Ĉeĥujo (1996), Aŭstralio (1997), Germanujo (1999) kaj Kroatujo (2001). Li prelegis pri melanomo en la Internacia Kongresa Universitato en Vieno. Li vojaĝis en Eŭropo per Esperanto kaj gastigis vojaĝantajn esperantistojn en la propra domo. Li eldonis proksimume 150 artikolojn (pri poezio, ŝercoj, aktualaĵoj, sciencaj aferoj, ktp) en diversaj kanadaj kaj internaciaj periodaĵoj. Li helpis en la reviziado de la *Plena Ilustrita Vortaro* (sekcioj pri ĥirurgio kaj medicino). Li redaktis la du medicinajn vortarojn de d-ro Yamazoe. Dum kelkaj jaroj li partoprenis en la redaktado de *Medicina Internacia Revuo*.

Li kompostis por *Inter Ni* (de la Halifaksa Rondo) kaj por *Lumo* (de la Kanada Esperanto-Asocio). Li fariĝis honora membro de UEA, de la Kanada

Esperanto-Asocio, kaj de la Esperanto-Rondo de Oradea (en Rumanujo).


En la jaro 2008, pro sia aĝo, Steĉjo translokiĝis al la atlantika insul-provinco Novlando por loĝi en apartamento en la domo de la filo, en la urbo St John's. Tie li studis matematikon kaj daŭre verkis Esperante, kompostis *Lumo*-n, kaj korespondis. La komputilaj dosieroj atestas, ke li korespondadis kun esperantistoj en pli ol 40 landoj.

Li postlasas filinon Cindy, familian kuraciston en Kalifornio, genepojn Teo kaj Rhiannon, ambaŭ lernejoj, filon Theodore, profesoron de komputila inĝenierio ĉe Universitato Memorial en St John's, kaj nepinon Saskia, ankaŭ lernejano.

[*Dankon al KEA kaj Bob WILLIAMSON pro la informo. —Red.*]

Ĉu vi volas gastigi la LK-on en 2017?

La Komitato por Landaj Kongresoj (LKK) jam komencis plani por venontjare, kaj la Landa Kongreso de Esperanto-USA en 2016 verŝajne okazos en la suda parto de Florido.



Sed kie okazos la kongreso en la jaro 2017? La LKK nun serĉas lokan grupon kiu volas gastigi tiun Landan Kongreson. Ni volas trovi lokon antaŭ la mezo de Junio, por ke ni povu anonci ĝin en Detrojto.

Se vi kaj via grupo volus gastigi la Landan Kongreson en la jaro 2017, bonvolu sendi retmesaĝon al la komitata estro Ron GLOSSOP ĉe <rglossop@mindspring.com>.

— *Ron GLOSSOP, Anjo HARLOW, kaj Jim HENRY, komitatanoj pri Landaj Kongresoj*

Korespondi deziras

Mi estas Mana Brinson, lernejestro de Esperanto en Demokratia Respubliko Kongo, en Suda Kivuo. Mi serĉas korespondantojn. Ni interŝanĝus mesaĝojn pri agrikulturaj projektoj, religio, metioj, lingvoj, popolartaĵoj, ktp.



<mana.esperanto.brinson@gmail.com>.
**Skajpe: brinson.mana26. Poŝte: B.P. 428
Rusizi Cyangu Ruando.**

Venu al la Komuna Kongreso en Detrojto!

[English text follows...]

Anonco en Esperanto

Ĉi-jare la 63-a Landa Kongreso de Esperanto-USA estos parto de Komuna Kongreso de la usona kaj kanada Esperanto-asocioj. Ĝi okazos de la 26-a de Junio (vendredo) vespere, ĝis la 29-a (lundo) tagmeze en Detrojto, Miĉigano. La kongresa temo estos *Eksteru la Interna Ideo*.

Ni aparte invitas partopreni komencantojn kaj alilandanojn.

Oni povas aliĝi ĉe la retbutiko de Esperanto-USA [http://esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=index&cPath=1004]. Membroj de Esperanto-USA jam ricevis paperan aliĝilon poŝte. Se vi ne ricevis ĝin kaj deziras aliĝi poŝte, bv. kontakti al Esperanto-USA ĉe: <eusa@esperanto-usa.org>.

Bonvolu kontribui al la programo!

Ni bonvenigas prelegantojn, muzikistojn, aktivulojn, ktp. Bonvolu priskribi vian ideon, ekipaĵajn aŭ hortabelajn bezonojn, ktp., kaj sendu la informon al Sherry WELLS ĉe <kongreso@esperanto-usa.org>.

Estas pluraj vidindaĵoj tre proksime al la kongresejo, inkluzive de la muzeoj *Detroit Institute of Arts*, *Detroit Historical Museum*, *Science Center*, *African-American Museum*, kaj *Motown Museum*.

English version

The 63rd National Convention will be part of a Communal Congress of Esperanto-USA and the Canadian Esperanto Association. It will take place from June 26 (Friday) evening through June 29 (Monday) midday in Detroit, Michigan, USA. The congress theme is *Eksteru la Interna Ideo*.

We especially invite beginners and visitors from other countries to take part.

You can sign up online [http://esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=index&cPath=1004]. Members of Esperanto-USA were sent paper sign-up forms by mail. If you did not receive one and would like to sign up by mail, please contact Esperanto-USA at <eusa@esperanto-usa.org>.

Please consider contributing to the program!

We welcome speakers, musicians, activity leaders, etc. Please describe your idea, any equipment or schedule requirements, etc. and send it to Sherry Wells at <kongreso@esperanto-usa.org>.

There are a number of attractions very close to the congress, including the Detroit Institute of Arts, the Detroit Historical Museum, the Science Center, the African-American Museum, and the Motown Museum.

“Al ĉiu homo estas nomo”

Holokaŭsta kunmemorigo

Fred MEYER, III

La 18-an kaj la 19-an de Aprilo, kelkaj membroj de la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso partoprenis en la 14-a Holokaŭsta Kunmemorigo — La Legado de Nomoj. Ĝi okazis ĉe la preĝejo Bejt Torao en Richardson, Teksaso, kaj kunordigis ĝin la Vira Klubo de Bejt Torao. Inter la esperantistoj tie estis Jarlo BILLS, Rhanda HALSEY, Elizabeto kaj Filipo DORCAS, kaj Susano kaj Fred MEYER.



La legado de nomoj. (Foto de David DUCHIN, DSPNphotos.com)

La ĉeftemo de la kunmemorigo estis legado de la nomoj de tiuj kiuj mortis en la Holokaŭsto antaŭ pli ol sepdek jaroj en Eŭropo. Subtemo de la ĉi-jara programo estis *Besa* — albana gastamo. La filmo *Besa – The Promise* estis prezentita, kaj sekvis prelego de Doc VRINICI, Administra Direktoro de la Alban-Usonana Kultura Centro de Dalaso, kaj muzika prezento de la ĥoro *Blue Cross Blue Shield Voices of Diversity*. Jarlo BILLS estas membro de kaj la Vira Klubo kaj la ĥoro.

La programo komenciĝis per ekbruligo de kandeloj nome al diversaj grupoj kiuj mortis en la Holokaŭsto. Poste, partoprenantoj legis la nomojn kaj aĝojn de mortigitoj, kaj ankaŭ lokojn kaj datojn de mortigo. La prezentoj antaŭe menciitaj okazis post matenmanĝo de la Vira Klubo. La legado kaj

aŭdado de nomoj daŭris post la prezentaĵoj. Inter la nomoj legitaj estis la nomoj de samseksemuloj. Tragedie, samseksemuloj kiujn ne mortigis la germana registaro reenkarceriĝis post la milito. La fifama Paragrafo 175 pri samseksemuloj en la germana leĝo restis ĝis la naŭdekaj jaroj. La evento daŭris dudek kvar horojn.

En la ĉambrego ĉe Bejt Torao estis kvar afiŝoj: la unua de la albana komunumo, la dua de esperantistoj, la tria de samseksemuloj, kaj la kvara montris pensojn de partoprenantoj. Sur la albana afiŝo estis la albana flago kaj kelkaj aĝoj montrantaj la agojn de albanoj kiuj protektis judojn kontraŭ la germana armeo dum la dua mondmilito. Ĝi ankaŭ inkludis informon pri la familio Babamusta, kiu gardis la vivojn de entute 176 judoj. La Esperanta afiŝo montris la Esperantan flagon, fotojn de kelkaj esperantistoj mortigitaj dum la Holokaŭsto, kaj diraĵojn de bone konataj homoj kiuj subtenis Esperanton, kaj ankaŭ de potenculoj kiuj kontraŭis Esperanton.

La albana kultura koncepto de *besa* estas duflanka. Unuflanke, oni devas gastigi pordofrapanton, eĉ se tiu estas nekonato. Kaj se necese, per sia propra vivo oni devas protekti tiun gaston. La devo ne malpliigis eĉ se la gasto kulture malsamas de la gastiganto. La reĝo de Albanujo ordonis ke judoj ricevu albanujajn pasportojn kaj vizojn por eniri kaj resti en Albanujo spite al la volo de la germana registaro. Sed pli grave estas, ke unuopuloj kaj unuopaj albanaj familioj endanĝerigis sin por protekti unuopajn judojn kaj judajn familiojn. Memoru, ke inter albanujanoj estis islamanoj, ortodoksuloj, kaj romkatolikoj. Ĉiuj el tiuj grupoj gastigis kaj protektis judojn dum la Holokaŭsto. Albanujo restas tolerema lando kun malgranda grupo de judaj albanujanoj.

La dua flanko de *besa* estas, ke promeso al gasto nepre devas esti plenumita. Do se oni konsentas teni aĝon por gasto ĝis la gasto revenas por ĝi, tiu


promeso etendiĝas al tiu kaj ties gefiloj, ĝis la aĝo estas finfine reakirita.



Foto de David DUCHIN, DSPNphotos.com

Tiu sindonemo inter albanoj al gastoj estas bela leciono por la mondo. Ni ĉiuj agu laŭ tiu leciono. Aplikado de *besa* al malsamaj grupoj plibonigus la

mondon, ĉu oni pensas pri religiaj grupoj, ĉu pri landanoj kaj enmigrantoj, ĉu riĉuloj kaj malriĉuloj, ktp. Pensu pri aliseksemuloj kaj samseksemuloj, kristanoj kaj islamanoj, islamanoj kaj bahaanoj, ŝijaistoj kaj sunaistoj, usonanoj kaj hispanulaj enmigrantoj, usonanoj kaj vjetnamaj kaj hmongaj enmigrantoj, eŭropanoj kaj afrikaj enmigrantoj, eŭropanoj kaj turkaj enmigrantoj, japanoj kaj koreaj enmigrantoj....



Fred MEYER III

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten.

Amikeco inter homoj kaj la disvolvo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

<f3meyer@texoma.net>

senintenca esperantaĵo?

Pace

Daĉjo RUTAN



Leganto Daĉjo RUTAN demandas: “Bona maniero manĝi spican manĝaĵon, ĉu?” Kompreneble. Onidire, Zamenhof mem proponis simile saĝan manĝkonsilon en frua malneto de *La Espero*: “Ĉe la pika manĝo de l’ vespero / kolektiĝas pacaj digestantoj...”

Tertremo en Nepalo

Lastatempe en Nepalo okazis katastrofa tertremo, la plej forta ekde 1934. La terura ŝancelado detruis tutajn vilaĝojn, mortigis pli ol sep mil homojn, kaj senhejmigis kelkcent mil pli.

Kelkaj membroj demandis pri la sano de niaj nepalaj amikoj. Jen raporto fare de Bharat GHIMIRE, Ĝenerala Sekretario de la Nepala Esperanto-Asocio. Sekvas informo pri kiel helpi viktimojn de la tertremo. — Red.



Nepalaj soldatoj kaj turkaj helpantoj kunlaboras post la tertremo. Foto de *Voice of America*.

De Bharat GHIMIRE:

Kiel vi ĉiuj scias, nia lando estis frapita de la forta tertremo (7.9 laŭ skalo de Richter) en pasinta sabato kiu mortigis milon da homoj kaj damaĝis neimageble multajn posedaĵojn.

Postskuado daŭris kaj daŭras kaj homoj devas dormi sub la ĉielo. Pro pluvo, la vivo estis pli terura por tiuj kiuj eskapis la morton. Preskaŭ ĉiuj domoj estis damaĝitaj sed multaj en Katmanduo estas bonŝance ankoraŭ loĝeblaj. Postskuado kaŭzis problemon por savi la viktimojn.

La epicentro de la tertremo estis Barpa, ĉirkaŭ 80 kilometrojn norde de Katmanduo. La plej bela loko en la mondo. Riĉa je la kulturo, naturo kaj biodiverseco. Barpa estas nun tute detruita. Preskaŭ duono de la loĝantoj mortis kaj ĉiuj domoj estis tute detruitaj. Simila situacio estas en multaj vilaĝoj en

la regiono. La dua plej difektita estas Sindupalchok, alia montara distrikto. Milo da homoj mortis kaj milionoj iĝis senhejmuloj. Ili ne havas tendojn por dormi kaj nenion por manĝi. Trinkakvo estas tre grandega problemo. En lokoj kie amaso da homoj loĝas, nun epidemio komenciĝas. Preskaŭ ĉiuj lernejoj ekster la valo estas detruitaj.

Alia kortuŝa afero estas, ke multaj atendis sub la ruino por savado. Sed pro manko de teknologio kaj sperta homarforto oni ne povis fosi ĝustatempe. Multaj atendantaj savadon eble mortis. Ĝis hodiaŭ kelkaj vivantaj homoj estis savitaj de spertuloj enlandaj kaj eksterlandaj. Oni suspektas ke milo da homoj atendis/atendas savadon sub la detruitaj konstruaĵoj.

La vivo de infanoj, maljunuloj kaj gravedaj virinoj estas tre mizeraj. La gravaj mondaĵ heredaĵoj en Katmanduo estas tute detruitaj kaj ĝi aspektas kiel ruinoj de Monzedaro kaj Harapo.

Ni elĉerpiĝis tiel ke ni ne povas stariĝi. Nepala Esperanto-Asocio, kiel landa asocio de UEA kaj ankaŭ samtempe parto de Nepala Registaro sentas respondecon kaj devon fari ion por la viktimoj en tiu ĉi terura momento en nia lando. Laŭ ĝisnuna informo, neniu esperantisto suferis je severa vundo aŭ mortis en la katastrofo. Tio almenaŭ estas bona por Esperantujo. Sed tuta homaro ploras je la bedaŭrinda kaj terura katastrofo. Do, ni petas al ĉiuj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj helpi per mondonaco al nia UEA-konto aŭ rekte al la konto de nia asocio. La mono estos uzata laŭbezone al la viktimoj.

Jen la kontodetaloj:

Ĉe UEA:

Nepala Esperanto Asocio
Neea-j

Ĉe banko:

Nepala Esperanto Asocio
Current Account No. 01900061100018

Swift kodo: HIMANPKA
Himalayan Bank Limited
Tridevi Margh, Kathmandu

En nia revuo *Montejo* la nomoj de mondonacintoj aperos kun la sumoj kiujn ili donacis, kaj ni informos pri kion ni faris/faros per la donacita sumo. Fine ni esprimas kortuŝan kondolencon al la familianoj de la mortintoj kaj esperas fruan resaniĝon por la vunditoj. Ni ankaŭ esprimas paciencon kaj kunlaboron inter esperantistoj por trapasigi tiun naturan katastrofon kaj tempon.

De Vilĉjo HARRIS, Direktoro de

la Centra Oficejo:

Esperanto-USA estas preta akcepti donacojn al la Nepala E-Asocio, por helpi homojn, kiuj suferis pro la tertremo. Sendu ĉekon kun klarigo al:

Esperanto-USA
1500 Park Av STE 134
Emeryville CA 94608

Aŭ sendu per kreditkarto [http://esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=product_info&cPath=1018_1017&products_id=18795].

Se vi preferas doni telefone, voku: 510.653.0998

senintenca esperantaĵo?

Deka

Breto SANDERS



Leganto Breto SANDERS demandas: “Ĉu tio ĉi signifas ke finfine, post naŭ antaŭaj aĉetoj, mi efektive trovis unu baterion kiu funkcios?” Nu, povas esti. Aŭ eble ĝi signifas, ke eĉ la deka aĉeto estis vana...

Vorto-Mozaiko: krucvortludo por Esperanto

Hoss FIROOZNIJA

Ofta ĝeno de tradukitaj vortludoj estas, ke ili ne bone konvenas al la lingvaj trajtoj de Esperanto. Ni pensu ekzemple pri Skrablo, krucvorta ludo elpensita por la angla lingvo. (La originalo nomiĝas *Scrabble*.) Sed vortfarado estas ĝenerale pli facila kaj regula en Esperanto ol en la angla, kaj kunmetitaj vortoj povas esti multe pli longaj. En praktiko, do, la vortoj en esperantlingva Skrablo ofte fariĝas absurdaj. (Vidu la artikolon pri Skrablo en n-ro 2014:2.) Malpli konata krucvortludo estas Vorto-Mozaiko, kiun oni kreis speciale por Esperanto. La ludon elpensis NISIKAWA Sirosi kaj SERIZAWA Kiyosi, kaj eldonis ĝin la Tokia Esperanto-Kooperativo (TEKo).

Vorto-Mozaiko plurmaniere similas al Skrablo. Ekzemple, oni ricevas lotece elektitajn literojn kaj provas formi vortojn; en unu vico, ludanto rajtas almeti literojn en nur unu direkto; novaj vortoj devas tuŝi almenaŭ unu literon de jam ludita vorto; ktp. Sed la reguloj estas ankaŭ kelkmaniere malsimilaj: eble plej grave, ili malpermesas la bizarajn kunmetaĵojn kiuj ĥaosigas Skrablon.



Ĉe NASK en 2012, ludantoj de Vorto-Mozaiko cerbumas intense kaj gravmiene. (Efektive, temas pri du samtempaj rondoj ĉe la sama tablo!)

Aspekte, Vorto-Mozaiko estas minimumisma: tute mankas ludtabulo. La kompleto konsistas el nur kartoj kaj (eventuale) skatoleto aŭ kaŭĉuka bendo

por kunteni ilin dum portado. La “tabulo” povas esti io ajn ebena: tablo, tapiŝo, benko, ktp.

Ĝis lastatempe, Esperanto-USA kaj UEA vendis ekzemplerojn de la ludo en siaj respektivaj libroservoj, sed ĝuste nun (en Majo de 2015) ambaŭ stokoj estas elĉerpitaj. Estas domaĝe, ĉar la kartaroj eldonitaj de TEKo estas aparte belaj kaj bonkvalitaj. Espereble oni planas novan eldonon. Intertempe, tamen, estas sufiĉe facile fari proprajn kartojn hejme.

Kartoj

Vorto-Mozaiko uzas 101 kartojn: cent estas literkarto, kaj unu montras nur stelon; ĝi rolas kiel ĵokero aŭ “ajnkarto”, simile al la senliteraj tegoletoj en Skrablo. La kartoj estas sufiĉe simplaj, ke oni povas fari ilin permane – ekzemple per indekskarto kaj feltkraĵono – aŭ, iom pli pene, per komputilo kaj lasera presilo. Ĝuste tion faris la aŭtoro; fine de tiu ĉi artikolo vi trovos ligilon al lia presebla PDF-dosiero.

Reguloj

Ekzistas pluraj manieroj ludi Vorto-Mozaikon. Fine de la artikolo vi trovos PDF-skanaĵon de la originala regularo; ĝi prezentas ne nur unu, sed *tri* ludmanierojn. Kiel klarigas la elpensintoj, iliaj proponoj “estas nur ekzemploj... ludantoj rajtas elpensi plaĉan ludon konforme al siaj kondiĉoj.”

Ĉi tie mi prezentas variaĵon de ilia unua ludmaniero, kiu estas la plej simila al Skrablo:

- Oni bone miksas la kartaron kaj disdonas po ok al ĉiu ludanto. La ceteraj kartoj restas en stako (kun literoj kaŝitaj) flanke de la tablo.
- Oni prenas unu karton de la stako kaj metas ĝin tablomeze, kun litero videbla.
- Laŭvice, ĉiu ludanto provas formi nova(j)n vorto(j)n per aldono de siaj propraj kartoj. La almetitaj kartoj devas esti en nur unu linio

vertikala aŭ horizontala, sen breĉoj, kaj ĉiu nova vorto devas ligiĝi al jam ludita vorto per almenaŭ unu karto.

- Se oni ne sukcesas formi vorton ene de unu minuto, la vico pasas al la sekva ludanto.
- Fine de vico, ludanto ricevas novajn kartojn el la stako, por denove havi ok.
- La ludo finiĝas kiam ĉiuj kartoj estas eluzitaj, aŭ kiam neniuj ludanto povas formi novan vorton.

Permesitaj “vortoj”

Efektive, en Vorto-Mozaiko oni ludas ne per “vortoj”, sed per la vort-eroj de Esperanto: radikoj, afiksoj, konjunkcioj, ktp. Ĉio estas permesita krom kunmetaĵoj, gramatikaj finaĵoj, kaj vortoj jam uzitaj.

Do permesita, ekzemple, estas **KUR** (radiko) aŭ **IG** (afikso) sed ne **KURIG** (kunmetaĵo). Al la jam ludita **KUR** oni rajtus aldoni novan karton por fari **KURB** (radikon) sed ne **KURI** (ĉar ĝi havas gramatikan finaĵon).

Poentoj

Poentado estas tre facila: je ĉiu vico oni simple nombras vokalojn en la nove formitaj vortoj. Do **KUR** valoras unu poenton; same **KURB**. La vorto **IAL** donas du poentojn; same **AER**. (En la kartaro de TEKo, vokaloj esti malhele koloritaj por faciligi poentadon.)

Ekzempla rondiro

Por komenci la ludon, oni prenas unu karton el la stako, kaj metas ĝin tablomeze:

K

Al tiu karto la unua ludanto almetas kartojn **A** kaj **J** horizontale por fari la konjunkcion **KAJ**:

K A J

Ĉar ĝi havas unu vokalon, li ricevas unu poenton.

La dua ludanto aldonas kartojn **M** kaj **L** vertikale por fari la afikson **MAL** (unu poento):

M
K A J
L

Tria ludanto aldonas kartojn **S** kaj **E** horizontale por fari la radikon **SEM** (notu la mankon de finaĵo) kaj la afikson **EK**:

S E M
K A J
L

Ŝi ricevas du poentojn entute: unu pro la **E** en **SEM**, kaj unu ĉar tiu **E** estas ankaŭ en la nova **EK**.

Utila por lernantoj

Pro ĝia simpleco, Vorto-Mozaiko estas kelkaspekte pli eleganta kaj utila instruilo ol Skrablo. Ĝi estas tamen malpli facila ludo, ĉar ne eblas simple (kaj senfine!) almeti afiksojn por formi novajn vortojn. Oni ja povas formi longajn vortojn, ĉar Esperanto havas sufiĉe multe da grandaj radikoj. Sed pli avantaĝa por ludanto estas firma posedo de la Baza Radikaro.

Ligiloj

Ĉe la retejo de *Usona Esperantisto* vi povas elŝuti la originalan regularon fare de TEKo, kaj ankaŭ PDF-dosieron por krei viajn proprajn kartojn.



Hoss FIROOZANIA

Hoss estis iama kogna sciencisto kiu nun laboras kiel komputilisto ĉe la Universitato de Roĉestro (Novjorkio). Tie li studas tradukarton kaj foje instruas Esperanton.

<hoss@lodestone.org>

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.